

SANO

4/86

**CIRKULERO DE MEDICINISTOJ, FARMACIISTOJ, GEFLEGISTOJ,
RUĜKRUCANOJ KAJ DE TIUJ, KIUJ INTERESIĜAS PRI MEDICINO**

ELDONAS: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, medicinista sekcio, Jilska 10,
CS/110 01 Praha 1, ĈSSR / kvarfoje jare kiel aldono de la
asocia gazeto STARTO

REDAKTAS: MUDr Josef HRADIL, CS-295 01 Mnichovo Hradiste N-ro 718,
ĈSSR

PRESAS: Grafika kunlaboro: Jiri Hanousek, Liberec
RUCH Liberec, UVTEI 85 027

Kiamaniere aboni nian cirkuleron?

La jarabono estas 10,50 nederlandaj guldenoj aŭ egalvaloro. Se vi ne povas aboni ĉe perantoj sube notitaj, skribu al ni. Ne forgesu mendi ankaŭ nian asocian gazeton STARTO kaj ĝian pluan aldonon, kulturan almanakon PANORAMO. Ĉiu peranto havas tiurilate necesajn informojn. Helpe de perantoj vi povas mendi ankaŭ diversajn niajn librojn, insignojn, glumarkojn kaj alian esperantaĵojn.

PERANTOJ:

BULGARIO : Bulgara Esperantista Asocio, Chr. Botev 97, Sofia

ĈSSR : Ĉeĥa Esperanta Asocio, Jilska 10, CS-100 01 Praha

GDR : Margit Volemann, 88-Zittau, Gubenstrasse 19

HUNGARIO : Dr-ino Istvanne Gajŭago, Karolyi Mihaly u. 41/B H-1053 Budapest

JAPANIO : Saburo Yamazoe, 371 Maebashi-Shi, Iwagami-Machi, 4/8/9 Gunna-Ken

POLLANDO : Stefania Wojciechowska, ul. Demokracji 12/10 PL-78-320 Polczyn-Zdroj

UEA : Universala Esperanto-Asocio, Nieuve Binnenweg 179, BJ 3015 Rotterdam,
Nederlando

USA : Bern Wheel Books, 834 Wenoah, Oak Park, IL-60304

NEKROLOGO

FORPISIS NIA HONORA PREZIDANTO D-RO HIDEO SHINODA

UMEA ESTAS EN PROFUNDA FUNEBRO

La 7-an de marto 1985 forpasis en sia naskiĝurbo Yamagata nia Honora Prezidanto D-ro Hideo Shinoda.

Li naskiĝis en la urbo Yamagata la 10-an de decembro 1901. Li vizitis la Medicinan Fakultaton de la Keio-Universitato kaj en 1927 li ricevis diplomon. Ekde 1928 li iĝis esperantisto. En 1932 li akiris doktoran titolon en ginekologia departemento de la universitato. Poste en 1934 li revenis al sia naskiĝurbo kaj laboris en hospitalo.

D-ro Hideo Shinoda multfoje veturis eksterlanden. En 1955 li vizitis Usonon kaj kelkajn europajn landojn kaj multfoje prelegis en Esperanto pri operacia tekniko de kancero de la utera cerviko kaj ankaŭ demonstris operaciojn de la kancero en Hamburg/FRG. En 1962 li fariĝis direktoro de la Shinoda Generala Hospitalo.

Inter 1965-1972 li estis Prezidanto de UMEA. Poste ekde 1973 li iĝis Honora Membro kaj Honora Prezidanto de UMEA, kaj ekde 1979 ĝis sia morto li estis Prezidanto de JEMA. Ankaŭ UEA alte taksis lian esperantistan agadon, li iĝis en 1979 Honora Membro de UMEA.

El sia kapitalo li fondis UMEA-Premion en 1973 kaj poste en ĉiu jaro pluraj gekolegoj ircevis arĝentan memormedalon kaj modpremion pro elstara faka referaĵo faritas en Esperanto aŭ pro longjara esperantista agado en la medicina movado.

D-ro Hideo Shinoda estis elstara persono en Esperantujo. Malgaŭ sia alta aĝo li regule vizitis Universalajn Kongresojn. Mi, kiel plej intima kunlaboranto de D-ro Shinoda, alte taksis lian entuziasmon kaj aktivecon renkontiĝante dum la Universalaj Kongresojn en Esperanto.

En nia memoro li vivas kaj vivos ĉiam. Lia meritplena nomo estu eterne benata ne nur inter medicinistoj-esperantistoj, sed ankaŭ en la tuta Esperantujo.

Li ripozu en paco!

D-ro Imre Ferenczy

Prezidanto de UMEA

ĤEMIIZO DE LA VIVOMEDIO KAJ LA HOMA SANO

AERO

Inĝ. Zdeněk Pluhař

1. Aero - antaŭkondiĉo de la vivo

Aero – ĥemia esenco de la tergloba atmosfero – estas gasa solvaĵo konsistanta precipe el nitrogeno (78 volumenaj %), oksigeno (21 volumenaj %) kaj argono kun ceteraj inertaj gasoj (1 vol %). La donitaj indikoj, kiel ni tuj vidos, estas nur laboratorie idealaj. La reala tergloba atmosfero enhavas (kutime en onoj de procentoj) multe da aliaj gasoj, likvoj kaj solidoj. Al la lasta grupo oni povas alkalkuli ankaŭ diversajn erojn de vivanta materio (polenojn, mikroorganismojn k.s.) Estas diversaj teorioj pri la estiĝo de la nuntempa atmosfero, en unu afero ili akordiĝas: en la evoluo grave partoprenis la vivaj organismoj kaj la aero dankas al ili pro siaj nuntempaj stato kaj konsisto.

La plejmulto da organismoj, la homon ne ekskludante, estas aerovivaj (aerobiaj) – ili bezonas oksigenon por siaj enĉelaj bioĥemiaj procezoj per kiuj liberiĝas energio el nutraĵo. La organismoj prenas oksigenon por siaj vivo-procezoj el la atmosfero, sed kutime ne sufiĉas al ili ajna oksigen-hava atmosfero. Ili estas pli-malpli sentemaj por ĝia konsisto. Ekz. la atmosfero kun tro multe da O₂ povas kaŭzi malfacilaĵojn, sub 10% estas jam nespirebla. Ankaŭ diversaj „aldonaĵoj“ al la aero povas estigi pli-malpli gravajn perturbojn en nia korpo. Tial la aero, kaj speciale tia kia ĝi evoluis sur nia planedo, estas necesaga por nia vivo. Resume“ la organismoj estis „alĝustigitaj“ dum sia evoluo al certa difinita stato, gravaj devioj ne tolereblas.

2. Ĥemia malpurigado de la aero

Bedaŭrinde la homo kondukas al la tergloba atmosfero simile kiel al la akvo. Longan tempon li kredis al la praktika senfineco de la aero oceano, en kiu ajna kvanto da malpuraĵo perdiĝos senspure. Nun la homo jam scias, ke ankaŭ la kapacito de la atmosfero, simile kiel ĉe maroj, estas limigita. Por eviti eventualajn diskutojn ni tuj diru, ke ankaŭ la naturo mem, sen homa „peno“, malpuriĝas. Estu menciitaj ekz. NH₃ kaj H₂S kiel rezultoj de malaerobiaj procezoj, aŭ SO₂ el vulkanoj, Sed tiu „natura malpurigado“ estas aŭ relative etkvanta, kvankam daŭra, kaj la naturo kapablas teni ĉiaman relativan ekvilibron, aŭ temas pri grand-kvantaj malpuraĵoj, sed efikantaj dum relative mallonga tempo, post kiu havas la naturo longan tempon por renoviĝi en koncerna regiono.

La ĥemiaj malpuraĵoj eligataj pro la homa agado estas multe pli danĝeraj ol tiuj el la naturo. Nome, la fontoj de tiuj „nenaturaj malpuraĵoj estas tre neegalmezure dialokiĝintaj sur la Tero, ili estas plejparte koncentritaj sur la plej industriaj teritorioj (Usono, suda Kanado, Okcidenta kaj Meza Eŭropo, Japanujo, industria zono de Sovet-Unio) kaj tie ili multoble superas la „naturan malpurigadon“. La listo de ĥemiaĵoj eligataj en la aeron de la homo estas multe pli riĝa, multaj ĥemiaĵoj krome estas pro la naturo tute fremdaj, ĝi ne renkontis ilin dum sia antaŭa evoluo. Sed la plej grava fakto estas, ke ofte estas tiuj atmosferaj malpuraĵoj faritaj de homoj biologie multe pli agresemaj. Pro la ĵus menciitaj faktoj ni studos nur la ĥemian malpurigadon kaŭzitan de homoj, ĉar nur ĝi endanĝerigas la naturan ekvilibron.

Funkcias ankaŭ mempurigado de la atmosfero, sed ĝia meĥanismo estas alia kompare kun tiu en la kavo. En la akvo temas vere pri likvidado de malpuraĵoj pere de mikroorganismoj, helpe de komplikaj bioĥemiaj procezoj, El la atmosfero estas la malpuraĵoj nur ellavataj de pluvo aŭ sorbataj sur polvoj. Do, la aero puriĝas, sed je la konto de akvo kaj grundo.

Sur la dislokiĝon de malpuraĵoj efikas precipe la moviĝado, fluado, de aero. Intensa aer-fluo (vento) povas transporti la ĥemiajn reziduojn en la distancoj de centoj da kilometroj. Tiamaniere acidaj pulvoj estiĝintaj en Usono endanĝerigas Kanadon kaj tiuj el GDR kaj CS falas sur Skandinavion. Male, en la stabila (senventa) atmosfero, kia estas precipe dum la temperaturo inversio, la malpuraĵoj ne disiĝas kaj amasiĝas ĉe sia fonto. Sub la eksterordinare malfavoraj kondiĉoj povas estiĝi eĉ mortigaj koncentrecoj. Tial videblas, ke la altegaj kamentuboj estas pli-malpli naiva solvo – aŭ ili ne multe helpas aŭ solvas la problemon je la konto de niaj najbaroj.

La danĝeraj ĥemiaĵoj el la aero eniĝas en la bonan korpon precipe tra la supraj spir-vojoj. Ju pli solveblaj ili estas, des pli facile kaj rapide ili penetras en la korpon kaj efikas sur la homan sanon. Lap lej solveblaj penetras jam tra la naza kaj buŝa mukozoj en la sangon. Ili efikoj povas prezentiĝi, laŭ la koncentrecoj kaj tempo de la eksponado, ekde la neintensa iritado ĝis la lezo de mukozoj aŭ haŭto, de la sendanĝeraj san-devioj ĝis la gravaj malsanoj eĉ morto pro ĥronikaj aŭ akutaj veneniĝoj. Sed ne temas nur pri la venenoj en klasika senco, kiuj sidrompas kutime enzimajn

sistemojn grave atakante diversajn organojn (centran aŭ periferian nervajn sistemojn, kardiovaskulan sistemon, spir-organojn ktp, kpt.). Dum la lastaj jaroj ĉiam pli studata estas la ĉeesto de kancerogenaj kaj embrio-toksaj (teratogenaj) ĥemiaĵoj en la sero. Cetere la atmosferaj malpuraĵoj povas kaŭzi ne nur certan malsanon, ili povas damaĝi nerekte pro la ĝenerala malfortigo de la organismo (resp. De ĝia imunogena sistemo), kiu poste pli facile estas venktara de infektoj.

3. Eblaj solvoj de la problemo

Sen akvo povas la homo vivi proksimume 5 tagojn, sen aero 5 minutojn. Tial la problemo de la malpura atmosfero estas vere solvenda, se ni ne volas devigi niajn idojn vivi la tutan vivon en gas-maskoj. La solvo estas tre komplika, ĉar la malpurigantaj substancoj estas ege diversaj laŭ siaj ecaroj, t.e. dependas de tiu ĉu temas pri solidoj (polvo, flug-cindro), likvoj (gutoj de H₂SO₄, solvo dependas ankaŭ de tio, ĉu la malpurigantaj fontoj estas punktaj, liniaj aŭ areaj, ĉu ili estas senmovaj aŭ moviĝantaj (moveblaj) ktp.

Certe plej bone solvita estas la problemo de solidaj malpuraĵoj, t.e. de flug-cindro, polvo. Ĝi cetere estas plej longe studata. Inter malnovaj diversaj sekaj meĵanaj senpolvigiloj oni povas ekz. nomi polvofiltrilojn, sedimentigajn kaj persienajn senpolvigilojn, sed ilia efikeco ne estas kontentiga, inter 60 kaj 80%. La 99%-an efikecon atingas t.n. ciklonaj senpolvigiloj, nun vaste aplikataj. Al la 100%-a efikeco alproksimiĝas modernaj elektrostatakaj kaj plej diversaj malsekaj (kun likvaĵoj) senpolvigiloj. Kompreneble la problemo definitive finiĝas nur tiam, kiam oni ankaŭ solvis – kion fari kun la kaptita polvo.

La likvaj malpuraĵoj oni povas iam kaptadi per la apararoj similantaj al ĥus menciitaj modernaj senpolvigiloj, ekz. per elektrostatakaj filtriloj aŭ diversaj malsekaj sorbiloj. Iam la problemo similas al tiu de gasaj malpuraĵoj.

Ĉu la gasaj malpuraĵoj ofte elstaras la problemo: la koncentro de la gaso, kiu estas fiziologie jam tre efika, estas tro malalta el la vidpunkto de ekonomia prilaborado de ĉi gaso. Sed venonte la nura ekonomia vidpunkto ofte devos cedi. Por la gasoj oni aplikas aŭ deversajn ĥemajn reakciojn (neŭtrigon, oksidigon, redukon, ĥemi-sorbon) aŭ fizikajn procedojn (ekz. sorbajn kaj kondensajn procedojn).

Ankaŭ ĉe la aero validas la samo, kio ĉe la akvo: la plej bona solvo ne estas tiu, kiu riparas la sekvojn, sed tiu evoluiganta tiajn teĥnologiojn, kiu ne estigas atmosferajn malpuraĵojn.

FLARSAĴO, SALVOLATILO, AMONTA KARBONATO

De: Bernard Golden

Neniu el la tri terminoj en la titolo de tiu ĉi artikolo estas registrita en la du Esperantaj medicinaj terminaroj je mia dispo: Esperanta Medicina Terminaro de Josef Hradil (1979) kaj Malgranda Medicina vortaro de Eŭgeno Josefo Kucharz (1985). Laŭ The Concise Oxford Dictionary, la angla esprimo smelling salts estas amonia karbonato miksitita kun parfumo por esti enflarita okaze de sevnado, ktp. La miksaĵo kutime estas portata de eventuala uzonto en poŝa flakoneto nomata smelling bottle. Sinonimo uzata en la angla lingvo estas sal volatile, kunsistanta el du latinaj vortoj signifantaj volatilan salon. Ĝi akiris tiun nonon, ĉar en kondiĉoj de ĉambra temperaturo la alkoholo aŭ amoniako formanta la solvaĵon, spontane vaporiĝas.

Demando pri la esperantiĝo de tiu esprimo estiĝis dum kompilado de la publikigota mezgranda hungara-Esperanta vortaro. Unu el la kunlaborantoj, Lajos Kovacs, kiu estas kemiisto, faris

profundan esploron de la demando, trakribante la fakan literaturon kaj vortarojn. La nomoj en diversaj enolingvoj diferencas sufiĉe por fari malfacila la elekton de ununura internacia termino. Ĝuste tio estas unu el la mankoj en la esploro de s-ro Kovacs, kies rezultoj estas prezentitaj en la formo de okpaĝa hungarlingva raporto: liaj bibliografiaj fontoj referencas nur verkojn en eŭropaj lingvoj. Estus ja interese scii, kiel oni nomas tiun kemiaĵon en, ekzemple, la landoj de Azio. Kaj se ne ekzistas tie preparaĵo baŭita ĉefe sur amonia karbonato, eble alia substanco havas la saman funkcion kaj efikon.

Ĉar ne estas havbeblaj tiuj donitaĵoj, ni ekzameni ekvivalentojn en kelkaj eŭropaj lingvoj laŭ jena klasifiko.

1. Nomoj bazitaj sur la uzmaniero > enflarado

A) smelling salts, G. Riechsalz, Hung. Szagloso

2. Nomoj bazitaj sur la fonto de la amoniako, ĉefe la kornaro de cervo

A) salt of hartshorn, G. Hartshornsalz, Hirschhornsalz, Hung. Aganceso, szarvasso

3. Nomoj bazitaj sur propreco de la substanco: vaporiĝanta salo

G) Fluechtiges englisches Salz, Geistersalz, H) repuloso, F) alcali volatile concret, L) sal volatile

4. La kemia termino $(\text{NH}_4)_2\text{CO}_3$

A) amonium carbonate, H. Amonium-karbonat, F. Carbonate d' amonium, carbonate d' amoniaque, L. Ammonium carbonicum

Kovacs citaĝs terminojn el tri Esperanto-vortaroj

1. Plena Ilustrita Vortaro (1970)

salo 4. En la malnova kemio, solida, nebrukligebla, gustosubstanco: spirigi salojn al sveninta fraŭlino

2. Esperanto and English Dircionary de J. C. Wells (1969) sal volatile – amoniaka alkoholaĵo

3. Vorterbuch Deutsch-Esperanto de E-D. Krause (1983) Hirschhornsalz-amoniakkarbonato

Rezulte de sia esploro, s-ro Kovacs rekomendas, ke en la mezgranda hungara-Esperanta vortaro oni ne traduku la hongaran komunuzajn nomojn: repuloso (fluganta salo), agancso (kornasalo), szagloso *flarsalo). Ĉe repuloso estas resendo al la kemia faktermino amonium-karbonat, kie troviĝas la Esperantaj ekvivalentoj „amonia karbonato“ aŭ „diamonia trioksekarbonato“. Tiel, skribas Kovacs, „en minimumo loko la leganto ricevas maksimuman informon-komprenebla, tie ĉi estas nur la pinto de la glacimonto“. Ĉe la fino de sia studaĵo li aldonas ankoraŭ du esprimojn por diferencigi repuloso de szagloso - „volstila salo“ kaj „flar-salo“ respektive.

Miaopinie, en riĉa lingvo estas necesaj almenaŭ du esprimoj, unu faka aŭ kemia kaj la alia komunuzaj. Lekkofoje eĉ tria, arkaika, estas utila. Unu el la komunuzaj esprimoj povas esti „flarsalo“, sugestita de la aŭtoro de la raporto. Ĝi havas apogon de la britaj vortaristoj Fleming Fulcher kaj Bernard Long, kiuj en sia English-Esperanto Dictionary (1963) registras (1) smelling salts-flarsaloj, kaj (2) smelling bottle-flarbotelo. Utila estas esperantigo ankaŭ de la latina esprimo sal volatile pro ĝia internacieco. Mi ne aprobas „volatila salo“, ĉar diversspecaj saloj povas esti volatilaj. Pli bona termino estas „salvolatilo“, registrita de Fulcher kaj Long. Ĝi estas analogie surbaze de

„salamoniako“ (amonio klorida) trovebla en multaj Esperantaj vortaroj. Ni do, havas tri kvazaŭ sinonimojn

1/ flarsalo - komunuza, eble ankaŭ arkaika, termino por substanco populara en la 19-a jarcento sed ne plu uzata hodiaŭ

2/ salvolatilo - ĝenerala esprimo

3. amonia karbonato – kemia fakesprimo

KELKAJ NOTOJ AL LA FARADO DE FAKAJ TERMINOJ

Inĝ. Zdeněk Pluhař

Ĉar la revuo SANO jam malfermis la pordon por la diskuto pri la terminologiaj aferoj publikiginte la artikolon de s-ro Bernard Golden: „Flarsalo, salvolatilo, amonia karbonato“, mi ankaŭ kuraĝas aldoni kelke da notoj. Similajn problemojn mi renkontas en nia Scienca-Teĥnika Sekcio de ĈEA, kiel komisiito por la faka lingvo kaj terminologio, sed precipe kiel redaktanto de la kolektoj de prelegoj por ARST. Tial mi studos la problemon iom pli larĝe.

Por la okazo, ke oni devas konstrui iun novan terminon ne povante trovi kontentigan ekvivalenton en haveblaj vortaroj kaj terminaroj, mi aplikas la jenan „regularon“:

1-e: ajna faka termino, eĉ tiu apartenanta precipe al la komunuza lingvo, donu almenaŭ minimumon da ĝ u s t a informo. Plej bone estas, se la termino estas tre konciza difino de la respondanta nocio, kio estas dezirinde precipe por scienca lingvo.

2-e: oni ne imitu sklavece nacilingvajn terminojn, kiuj estas nelogikaj aŭ tute sensencaĵoj, eĉ se ili devenas el t.n. mondlingvoj. Cetere tio estas sekvo de la rigora obeo al la 1-a punkto. Eo rajtas kaj devas esti pli logika eĉ en komunuzaj esprimoj, ĉar ĝi estas pli logika kiel lingvo mem, kompare kun la naciaj lingvoj.

3-e: oni ne enkonduku superflujajn neologismojn. Ili vere estas hodiaŭ pravigeblaj nur ĉe la nove aperintaj tre specialaj nocioj en scienco kaj teĥniko, por la ceteraĵo havas la nuna Eo jam sufiĉe da lingvaj rimedoj

4-e: Ĉe sufiĉe specialaj nocioj ne timu plurvortajn terminojn. Kvankam Eo, pro sia aglutineco, allogas aŭtorojn al la kunmetado de longaj vortoj (iam eĉ vortaj monstroj), estas pli imitinda „la angla maniero“ de la termin-farado (t.e. kiel eble mallongaj vortoj, se necese – tiam plurvortaj terminoj), ol „la germana maniero“ (t.e. emo al la konstruado de longaj vortaj kunmetaĵoj). Ni konsideru, ke por preskaŭ ĉiuj legantoj ne estas Eo la gepatra lingvo, tial la relativa facileco de la legado estas ankaŭ grava avantaĝo.

La nocion diskutitan en la artikolo de s-ro Golden mi difinus jene: salo uzebla por flarado kiam oni estas svenonta. Por la mezgranda hungara-Esperanta vortaro estis proponitaj la kvazaŭsinonimoj: „flarsalo“, „salvolatilo“ kaj „amonio karbonato“. Mi analizos ilin laŭ supre prezentitaj postuloj.

La malnovaj farmaciistoj konis la diskutatan substancon sub la latinaj nomoj: „sal volatile ammoniaci“, „sal volatile cornu cervi“ kaj „sal volatile siccum“. Naciaj lingvoj estis uzantaj aŭ siajn proprajn terminojn, aŭ ofte pli-malpli liberan tradukon de unu el la latinaj. Nur la angla lingvo transprenis senĝsanĝe „sal volatile“, do la internacieco de ĉi termino estas sufiĉe limigita. Eventuale uzeblajn ekvivalentojn amoniaka volatila salo aŭ seka volatila salo mi hezitus rekomendi. Ilia informa valoro estas preskaŭ nula. Nun oni jam scias, ke la koncerna salo (aŭ saloj) ne estas

volatila, t.e. facile vaporiĝema, sed facile malkombiniĝema *la ĉefingredienco disiĝas en karbonan dioksido, akvon kaj amoniakon). Seka povas esti ajna alia salo. Simile oni povas juĝi pri la termino Salo el cerva korno, oni jam longan tempon ne fabrikas la „farmaciaĵon“ per la seka distilado de animalaj (haŭtoj, hufoj, kornoj 0 ne nur cervaj) sed per la ĥemia sintezo. Kontraŭ la termino „salvolatilo“ mi protestus. Mi ĝin komprenas aŭ kiel superfluan kaj miskomprenigan neologismon „salvolatil/o“, aŭ kiel erare konstruitan terminon „sda/volatil/o“. Nome la radiko „volatil“ estŝas adjektiva, tial la vorto „volatilo“ estas abstrakta, sed la diskutata „medikamento“ estas konkretaĵo – mi eble tolerus la terminon salvolatilaĵo. Tamen, se mi volas obei ĉiujn 4 supre skribitajn regulojn, mi rekomendus por la diskutata nocio nur la terminon (amoniaka) flarsalo. Ĝi almenaŭ informas pri la uzo de la farmacie aplikata ĥemiaĵo (flarado), eventuale ankaŭ pri la ĉefa efika agenco (amoniako).

La rigore sistema nomo por la ĥemiaĵo kun la ĥemia formulo $(\text{NH}_4)_2\text{CO}_3$ estas diamonia trioksikarbonato, eventuale iom simpligita diamonia karbonato. Pluan simpligon mi ne rekomendus por Eo, kvankam naciaj lingvoj kutime toleras ellason de la numerala prefikso „di“, la kialo estas klarigita en la punkto 2. Sed „diamonia karbonato“ ne estas centprocenta sinonimo de „amoniaka flarsalo“. Kaj la malnova kaj la moderna teĥnologioj de „flarsalo“ ne rezultigas nur puran diamonian karbonaton, sed ankaŭ en la konsiderinda kvanto ĉeestantajn amonian-hidran karbonaton, NH_4HCO_3 , kaj amonian karbonaton $\text{H}_2\text{N.COONH}_4$. Mi ankaŭ ne konsideris intencajn aldonaĵojn.

La dua diskutinda afero povus esti, ĉu tiajn temrinojn kiel estas „flarsalo“ envicigi en mezgrandajn vortarojn. Sed tio jam estas kompetenteco de la kompilantoj kaj de la recenzantoj. Mi opinias, ke ne estas manko, se la diskutita termino – amoniaka flarsalo – ne troviĝas ekz. en „Esperanta Medicina Terminaro“ de D-ro Hradil. La flarsalo neniam estis grava farmaciaĵo, nuntempe jam estas por farmacio kaj medicino preskaŭ senŝignifa. Eble pli konata por la publiko estas alia uzo de la diskutita miksaĵo de amoniaj saloj, speguliĝanta ankaŭ en alia nomo: t.n. „sukeraĵista gisto“. Sed tio jam estas alia fakto.

NOVA DIAGNOZA METODO -IMUNA SCINTIGRAFIO

estas enkondukata en la vivon en Okcidenta Germanujo, praktikante malkovron de okcidentgermana biologo profesoro Georges Koehler kaj lia kolego anglo de argentina deveno Cesar Milstein, kiuj malkovris monoklonajn antikorpojn kaj ricevis la Nobelpremion en la jaro 1984. Tiuj „laboratorie instruitaj priflarantaj hundoj“, kreitaj laŭ ekzemplo de homa imuna sistemo, diferencigas karcinomajn ĉelojn laŭ ilia okulfrape diferencaspekta surfaco, kovrita de specialaj antigenoj. Por malkovro de la ĉeloj de karcinomo de stomako, intesto kaj pankreato konvenas antikorpoj signitaj CA 19-0, kaj CEA. Ilia miksaĵo malforte signita per radioizotopo grandigas ilian spurserĉantan efikon.

La frankfurtaj sciencistoj aplikas kun la menciitaj antikorpoj la miksaĵon envejne kaj jam post kelkaj horoj videblas pli grandaj metastazoj. Pli malgrandaj fokusoj montriĝas post unu ĝis du semajnoj. Komputera programo ellaborita de prof. Gustav Hoer, d-ro Richard Baum kaj D-ro Ruediger Staudek montras sur la displejo ruĝe kaj blue lokojn, kie la antikorpoj koncentriĝas. Merite de la nova tekniko sur la televida ekrano bildiĝas ostoj kaj per metastazoj priminacita hepato tiel, ke hodiaŭ estas metastazoj precize lokigitaj. Tiu-ĉi imuna scintigrafio malkovras fokusojn grandajn 5 milimetrojn. La metodo helpas al la decido, ĉu operacii aŭ ne, ĉu elekti ĥemoterapion aŭ kontroli la kuracefikon de la antikarcinoma kuracado. Nur nun la sciencistoj kapablas, povos

respondi, cĉu la tumoroj post la enkondukita terapio ne aktiviĝas. La metodo malkovras metastazojn kun precizeco de 96 procentoj.

La imuna scintigrafio estas ankaŭ metodo uzebla por elektometodo de tumoroj, ĉar ĝi montras la danĝeron multe pli frue, ol la paciento komencas senti sin laca aŭ malforta. Ekzistas ankaŭ la dua miksaĵo signita per kodo CA 15-3, kiu estas sammaniere uzebla por malkovro de antigenoj ĉe karcinomo de mamo. Baldaŭ estos uzeblaj monoklonaj antikorpoj kontraŭ karcinomo de pulmo, testiko, prostato kaj haŭto. Tiamaniere venos granda helpo por diagnozado de la plej oftaj karcinomoj de la homo.

En multaj laboratorioj estas nun esplorata la maniero, kiel povus monoklonaj antikorpoj estis portantoj de ĥemoterapiiloj, kiuj celus precize en la mezajn de la tumoraj eĉ multilokaj fokuso.

La III-a MEDICINA TAGO

La 25-an de aŭgusto 1986 kadre de la XXIV-a Tutpollanda Esperanto-Kongreso en Krakovo la Medicinista Sekcio organizis jam la 3-an fakan forumon de medicinistoj nominatan MEDICINA TAGO.

Por rememoro – la I-a okazis la 20.8.1984 en Szczecin kaj la II-a okaŭis la 14.8.1985 en Poznan.

La programo konsistis el 7 disertacioj (prelegoj):

1. 15-jara agado de Kalisza konfida telefono – d-ro Andrzej Wagrzyn el Kalisz.
2. Pri iu rara kerstokondrozo – d-ro Margit Nagy el Szentes
3. Pri dilatiĝantaj vejnetoj = kol. Irena Kijas el Szczecin
4. La normala funkcio de spirado garantias la normalan evoluon de maĉorgano – d-ro Krystyna Swulinska el Koszalin

post paŭzo:

5. Interno de la ĉela membrano – doc. Leszek Kordylewski el Krakovo
6. La „seks guto“ kiel Ĝelo ordigita per jomoj - d-ro Margit Nagy el Szentes
7. Ĉina hospitalo - impresoj el Pekino - d-ro med. Maria Jackowska el Szczecin.

La prelegojn aŭskultis de 20 ĝis 100 personoj depende de la temo – la plej grandan frekventon havis tre interesa prelego de doc. L. Kordylewski. Ĉi-jara aranĝo havis la internacian ĥarakteron, ĉar partoprenis ĝin 3 hungaraj koleginoj.

Ni esperas, ke la IV-an MEDICINAN TAGON kiu okazos en 1988, partoprenos pli multe de eksterlandaj kolegoj.

Venontjare, ekde la 19-a ĝis 23-a de julio okazos ankaŭ en Krakovo la VI-a Internacia Medicina Esperanto-Konferenco.

Ni, polaj medicinistoj, tre kore kaj varme invitas ĉiujn gekolegojn al Krakovo.

Vizitu Pollandon en la jubilea jaro 1987 – partoprenu la VI-a IMEK kaj la 72-a U.K.

La precizaj informoj koncerne de partoprenkondiĉoj aperos jam nelonge en E/gazetaro.

Landa UMEA-delegito

d-ro Marian Laba

La VI-a IMEK (Internacia medicina Esperanto-Konferenco)

okazos en la periodo de 19-a ĝis 24-a julio 1987 en Krakovo, Pollando. La propono de la ĉeftemo estas>

„Sciencaj atingoj de esperantistoj-medicinistoj dum 100jara historio de Esperanto.

Aliaj temoj:

Fitorerapio en la nuntempa medicino

Prevento en la ĉiutaga kuracista praktiko

Sporto kaj medicino

Liberaj temoj

Konferencanoj loĝos en moderna studenthejmo de la medicina Akademio en dultitaj ĉambroj kaj ĉiuj aranĝoj estas en la proksimeco de la loĝejo.

Informoj: Mgr Wladimierz Opoka, PL 30=658 Krakow, Luzycka 65/13

ANONCOJ

Nepra kondiĉo por via aktiva kunlaboro kaj uzo de Esperanto en medicino estas ESPERANTA MEDICINA TERMINARO, eldonita en Japanio 1979, represita en Ĉeĥoslovakio 1982. Ĝi estas ankoraŭ havebla ĉe la Ĉeĥa Esperanto Asocio, Jilska 10, 110 00 Praha 1 – kontraŭ 19 Kcs (aŭ egalvaloro – event. 5 respondkuponoj).

Ĉu sekreto de „Legia malsano“ malkovrita?

(Fortschritte der Medizin, 104,9:13,1986)

Antaŭ nelonge mankis kiuj ajn imagoj pri tio, kie kaj kiel transvivas la kaŭzanto de tiu ĉi malsano, t.n. „legionella pneumophilla“ en ĥlorita akvo kaj kiel ĝi samtempe fariĝas fonto de la kontaĝo. Laŭ nuntempaj konoj ŝajnas esti certe, ke ĉi tiu patogeno parazitias en libere vivantaj kaj ĉie estantaj, al kies vivstilo alkiutimiĝas kaj la nutromaniero kaj metabolismo de la legioneloj. Ŝajnas, ke tiu ĉi patogeno kapablas ŝanĝi digestajn enzimojn de la amebaj en aminoacidoj, per kiuj la legioneloj nutriĝas. Neniu ankoraŭ konas, kiom da ili estas bezonataj por tio, ke la homo malsaniĝu per tipa bildo de la malsano: por kabajo sufiĉas 100 ĝis 1000 legioneloj, t.e. relative malgranda kvanto. Por la homo kaj pulma manifestiĝo de la „legia malsano“ oni superas nombron multe pli grandan. Tiuj ĉi kondiĉoj estas plenumitaj en la kazo, se okazas enspiro de unu aŭ pli multaj amebaj, kiuj havas sur si sufiĉan kvanton, tiel, ke la infekto povas ekpaŝi. La pulmo de la homo enhavas monocitojn kaj makrofagojn, kiuj multe similas amebajn kaj estas kapablaj engluti kaj likvidi bakteriojn. Se okaŭas difektiĝo, kia estas ekzemple ĉe fumantoj, poste ne estas la kaptitaj legioneloj mortigitaj, sed ili kondukas kiel en amebaj, t.e. ili multobliĝas kaj enkondukas la kontaĝan procedon.

Hese R.T. **Kora afunkcio ĉe juna virino post kuracado per kombino de Amitriptilino kaj Levopromazino** (Brit. Psychiatr. Vol 140,1985:320)

Kelkaj aŭtoroj, kiel ekzemple Herzmann (1987 komparas la influon de triciklaj antidepresivoj, plue TAD) sur koro kun efiko de Quinidino kaj parolas pri kvinidino-simila efiko, kiam povas aperi atrioventrikla bloko aŭ ventrikla fibrilado aŭ eĉ kora afunkcio. La plej multaj kazoj de kora

afunkcio inter pacientoj kuracataj per TAD, malpli multaj ĉe neŭroleptikoj, aperas ĉe pli maljunaj homoj aŭ tie, kie estas kora malsano en anamnezo.

Multe malpli ofta estas sciigoj pri subita misfunkcio de kora ritmo, ventrikla fibrilado aŭ eĉ afunkcio de koro ĉe junaj pacientoj kuracitaj per supre cititaj medikamentoj, kiuj pli frue ne travivis koran malsanon (Mocetti 1977, Hollister 1978). Kelkaj aŭtoroj (Sack 1977) referas pri ekzisto de tiaj kazoj. Risko pri koraj komplikaĵoj altiĝas, se la dozoj de TAD estas grandaj aŭ se TAD estas aplikata en kombino kun neŭroleptikoj (Hollister 1978). En literaturo ne estas mencio pri klinika morto post kora ĉeso kiel sekvo de la malfavora kombino kaj interagado inter Amitriptilino kaj Levopromazino, aplikataj en terapiaj dozoj. Estas grava fakto, ke kazuistiko citite en tiu ĉi studo, temas pri juna virino, havis malsanan koron.

Temas pri 34jara fraŭlino-inĝenierino, kiu estis akceptita pr en hospitaligo en depresia stuporo. Pli frue ŝi estis sana, ŝi ne havis kormalsanon – ripeta esploro de EKG dum enhospitaligoj en psikiatraj sekcioj estis normalaj. Ankaŭ dum akcepto ŝia EKG estis normala (nur tahikardio). 8 tagoj post akcepto komencis plialtigo de la dozoj de Amitriptilino ĝis 250mg tage (la 10-an tagon de kuracado). Ĉar la pacientino suferis pro sendormeco, ŝi prenis ankaŭ 100mg de Levopromazino antaŭ nokto. Ŝia stato signife pliboniĝis, la kontakto kun ŝi valoriĝis, ŝi estis malpli depresia. La 12-an tagon je la 10,30h okazis subita kora kaj spira halto. Hazarde anesteziologoj ĉeestis proksime kaj tuj komencis resusciton kun entubigo, subtena spirado kaj masaeo de la koro kaj sekva defibrilacio. La koro denove ekfunkciis je la 11,15 horo. EKG montris normalan akson, sunusan ritmon (96), nespecialajn nenormalaĵojn de la ST segmento, pliplatigojn de TA-ondoj en V2-6. Posttagmeze la pacientino konsciiĝis kaj ekkonis siajn gepatrojn. Je la 20,05 h aperis ventrikla fibrilacio, kiu malaperis sen kuracista necesa helpo. Poste oni komencis infuzon per Xilocain-o. Je la 22,55 h oni devis peti novan defibrilacion kaj je la 24-a horo necesis trakeotomio pro sekrecia amasiĝo bronka. Estontan tagon la stato de pacientino baze pliboniĝis kaj post 5 tagoj la EKG estis jam normala. (elangligis MUDr J. Veselý, Svitavy, ĈSSR)

HUMURAĴOJ

Flegistino al novobakita patro: „Mi gratulas al vi, la dua filo venis en la mondon.“

“Vi volis eble diri: la unua, ĉu?”

„Memkompreneble, la unua ankaŭ.“

„Mi gratulas, mi aŭdis, ke al vi naskiĝis la infano“.

„Jes, mi dankas“.

„Ĉu knabo?“

„Ne.“

„Ĉu kanbino?“

„Jes, kiel vi tion divenis?“
